



Ĉefartikolo

Modo en lingvo

Antaŭ kelkaj jaroj la nova vorto "molesti" subite kaj ial fariĝis laŭmoda. Oni ne povis legi artikolon, kiu ne entenus ĝin. Nun la modo forpasis kaj neniuj plendas. La vorton oni plu uzas, sed nur en okazo de vera bezono. Oni povus citi aliajn tiajn modojn . . .

Sed ekzistas ankaŭ negativa modo. Ekzemplo estas la delonga evitado de la vorto "antaŭnomo", kalkeo de la latina vorto "prænomen". Esperanto, kiel aliaj lingvoj (la Germana : Vorname) preferis kalkeon; aliaj lingvoj alprenis transskribon (la Franca: prénom).

Sed tiu evitado kondukis al uzado de multaj kritikindaj formoj; laŭ la reganta modo ni trovis : voknomo, baptonomo, eta nomo, ktp. Ĉiuj ĉi formoj kaj aliaj estis prave kritikataj. Absolute ili ne valoras pli ol la tradicia antaŭnomo; plie ili ne estas tradiciaj!

Nun la lasta modo proponas "individua nomo". Ne pli bona ol aliaj, ĉar "logike" la individua nomo estas tiu nomo, kiu karakterizas la individuon; ĝi do racie estas kunmetaĵo de la eventuala titolo, de la antaŭnomoj kaj de la familia nomo : D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof. Cetere voku "Johanon!" en klasĉambro, respondos deko da infanoj! Sed voku "Zamenhof" respondos nur unu individuo.

La evitado devenis de la fakto, ke en la praktiko la antaŭnomo estas skribe lokita malantaŭ la famili-nomo! Tiel estas en ĉiuj demandaroj, sliparoj kaj en ĉiuj listoj, jarlibroj (telefono, ktp). Oni atentis, ke antaŭ havas du signifojn, tempan kaj lokan. Jen infano en lulilo; oni certe ne nomos lin tuj "D-ro Zamenhof" kaj ankaŭ ne "Zamenhof" sed oni vokos lin per pli intima nomo, per pli "eta nomo"; ekz-e, "Lazaro". Tiun nomon la infano ricevas kiel unuan, do antaŭan, pli fruan ol la aliaj. Tradicie, jam de Latino, ĝi estas antaŭnomo : tiu vorto estas "pure kondiĉa nomo" (Zamenhof). Ni hodiaŭ dirus konvencia. Poste en ĉiu lando kaj tempo la modo, kiel ĉie, trudos siajn preferojn.

Sed certe estas, ke hodiaŭ la nomo "Zamenhof" nomas nur unu individuon. Ĝi estas individua nomo.

D-ro André ALBAULT

Kroniko de la Nuntempo



Ne estas evoluo sen tradicio . . .

nek vivas tradicio sen evoluo . . .

Jam de pluraj jaroj la t.n. "Analiza Skolo" en la nomo de la supera logiko pretendas modifi la uzadon de konjugacio, kies pli ol centjara tradicio fiksis laŭ iu same logika sed "perfekta" bazo de participa aksiomo. Kaj tiaj skolanoj eĉ ne konscias la disdialektiĝon, al kiu ili riskas alvenigi la lingvon ne nur pro la faro sed ankaŭ pro la ekzemplo! "*Erare humanum est, perseverare diabolicum!*" *)

Aliflanke kultantoj de "Bona Lingvo" fanatike rifuzas uzi la Latin- kaj Grek-devenajn terminojn de la scienca kaj teknika evoluo; alidire, neante la ekziston de lingvonivelejo en Esperanto, kiel cetere en ĉiu lingvo, ili malakceptas, ke kuracisto parolu pri *kardiopatio* anstataŭ *kormalsano* . . . Ĉia eksceso ĉiam malbonigas estontecon!

Kaj jen de Sud-Ameriko ŝprucis disĉiplo sin nomanta "Ergoto", kiu ne nur konsideras kiel "Esperantalo-n" la sciencajn Latinajn aŭ Grekajn terminojn, sed krome riproĉas eĉ la uzon de tradiciaj vortoj kiel *entenas*, al kiu li preferas *enhavas* . . . Ja tiel kritikaĉante, li eĉ ne konscias, ke li korektas D-ron L. L. Zamenhof mem, kiu skribis interalie: "*El sama tero venas, saman sukon entenas!*"

Verfakte ĉiuj tiaj pretendoj de "Analiza Skolo" kaj "Bona Lingvo", ankaŭ la pretendoj de "Ergoto" kontraŭ la t.n. "Esperantalo", devenas de la sama deziro aŭ aroganteco trude plibonigi la lingvon, same kiel estis proponitaj Ido kaj la diversaj Esperantidoj! Tiaj celoj de propraj ambicioj estas danĝeraj pro la risko de ia dialektiĝo, kiun ili "entenas"!

Ĉe tiaj konstatoj oni pli klare povoscias taksi, kiel genia estis kaj restas la intuicio de D-ro L. L. Zamenhof, kiu ne nur bone komprenis la neceson kaj de tradicio kaj de evoluo: "*La evoluado de la lingvo fariĝos per la senrompa vojo de neologismoj kaj arĥaismoj*"; sed kiu ankaŭ ĝuste tial stariĝis la Fundamenton kaj la Akademion por eviti ĉian deflankiĝon, kiu des pli minacas nian lingvon, ke ĉi tiu disvastiĝas tra la tuta terglobo.

J. T.

*) "*Erari estas home, persisti demone*".

Analizo de provoj asimili la Svislandan urbonomon *La Chaux-de-Fonds*



1. Ĉiuj vojoj al *La Chaux-de-Fonds* kondukas al kaoso

Mi jam verkis du artikolojn pri la manieroj asimili la Svislandan urbonomon *La Chaux-de-Fonds* (1a, 1b) kaj montris, ke plej probable ekzistas pli da kapricaj esperantigoj de tiu toponimo ol de kiu ajn alia en Eŭropo, eble en la tuta mondo. Mi intence kvalifikas la asimilaĵojn kiel kapricajn, ĉar oni per kontraŭaj principoj aŭ simple laŭ sia bontrovo elcerbigas plej diversajn Esperantajn formojn de tiu nomo. Post mia unua rikolto de kvin variaĵoj aperintaj en publikigitaj verkoj (1a), mi kolektis pli da ekzemploj, kiuj apogas la ĉi-supran observon. Ankaŭ mi havas kelkajn proponojn, kiuj eble meritas atenton, ĉar mi pli profunde ekzamenis la demandon, korespondante kun Svisoj, kiuj loĝis en *La Chaux-de-Fonds* aŭ kiuj okupiĝas pri la toponimiko de sia hejmlando. Cetere, mi informiĝis pri la historio de la urbo kaj la etimologio de ĝia nomo. La diversaj donitaĵoj, kiujn mi kolektis, montras, ke la ĝisnunaj asimilad-proponoj ne estas tute kontentigaj.

2. Jam esperantigitaj formoj de *La Chaux-de-Fonds*

Mi resume pritraktos la kvin asimilitajn nomojn, kiujn mi listigis en Aprilo 1989, kaj poste aldonos tiujn formojn, kiujn mi registris en la sekva periodo de pli ol du jaroj.

1. ĈODEFONO (Svisa Esperanto-Revuo = SER)

La uzo de Ĉ indikas esperantigon laŭ la grafisma principo por la unua litero de la nomo kaj same por la dua silabo *de*.

2. ŜODEFONO (La Gazeto)

Per apliko de la fonetisma principo, la Franca digramo *Ch* fariĝas *Ŝ* en Esperanto. Fonetismo speguliĝas ankaŭ en la lasta silabo, kie mankas la neprononcata Franca *d*. Tamen, ne estas eble redoni per la Esperanta alfabeto la nazalan vokalsonon *on*.

3. ŜODFONA (Monata Cirkulero)

En tiu ĉi adjektiva formo okazas provo eĉ pli fidele prezenti la prononcon de la urbonomo per elimino de la apenaŭ aŭdebla Franca *e* en *de*, sed la fonetismo ne estas centprocente preciza, ĉar ne estas indiko, ke la *d* povas fariĝi *t* antaŭ la senvoĉa *f*: *ŜOTFONA*.

4. ĈAŬDEFONO (Literatura Foiro)

La unuaj du silaboj montras grafisman asimiladon, sed la lasta silabo estas fonetisme traktita, ĉar la *d* mankas.

5. LAŜODFONO (Speciala Cirkulero)

Tiu ĉi esperantigo laŭ la fonetisma principo diferencas disde n-ro 3 pro inkludo de la difina artikolo *La* kiel integra parto de la Esperanta nomo.

6. ĈAŬDEFONDO (Bernard GOLDEN)

Mi proponis tiun ĉi esperantigon surbaze de la principo de analogio, pravigante ĝin per citado de aliaj asimilitaj Franc-devenaj loknomoj (1a). La celo de mia grafisma solvo estas konservi la skribbildon de la originala nomo. Rimarku, ke la sola diferenco inter n-ro 4 kaj n-ro 6 estas la inkludo de *d* en 6.

7. LA ŜO-DE-FON (Kontakto)

Ĝi estas iom stranga fonetisma asimilado kun la difina artikolo staranta aparte antaŭ la tri

partoj de la nomoi, dividita per streketoj, same kiel en la etnolingva formo.

8. LAŜODEFONDO (Leksara kolekto de ofte uzataj propraj nomoj)

Rikardo Ŝulco kaj Hermano Bermanno, la gvidantoj de la Analiza Skolo, miksas fonetismon (*ŝo*) kun grafismo (*de, fondo*) en nomformo kun la difina artikolo *La* asimilita kiel la unua silabo, same kiel en n-ro 5.

9. ĈAŬDEFONUJO (Literatura Foiro)

En artikolo pri la onomastiko en Esperanto (2), d-ro André Albault blage prezentas tiun ĉi formon, kiun eble proponus homoj, kiuj volas formi ĉiuspecajn landnomojn per *-ujo*, el kiuj ajn radikoj, eĉ se ili ne havas signifon de etno. Tiel ili kreas novan etnonomon. Tio signifas, ke la anoj de la urbo estas *Ĉaŭdefonoj!*

10. LA CHEAU DE FONT (Bulgara Esperantisto)

Tiu ĉi bizara ortografio ne estas provo asimili la Francan nomon sed imagita literumado de la originala nomo, kiun faris persono, kiu plej probable legis ĝin en iu aŭ alia Esperanta transskribo kaj poste prove retransskribis ĝin al la Franca!

3. La traktado de la difina artikolo en Esperantaj toponimoj

En Esperantaj vortaroj kaj aliaj publikaĵoj, etnolingvaj loknomoj havantaj difinan artikolon, singularan aŭ pluralan, estas asimilitaj en neregula maniero.

a. Ellaso

Francaj : Havro (*Le Havre*), Manso (*Le Mans*), Roĉelo (*La Rochelle*);

Hispanaj : Havano (*La Habana*), Salvadoro (*El Salvador*);

Portugala : Porto (*Oporto*);

Nederlanda : Hago (*den Haag*).

b. Konservoj

Hispanaj : La-Pazo (*La Paz*), La-Plato (*La Plata*), Los-Anĝeleso aŭ Losanĝelo (*Los Angeles*);

Itala/Malta : La Valeto aŭ Lavaletto (*La Valletta*).

c. Familiaj nomoj kun konservoj de la difinita artikolo

Francaj : Lafonteno (*La Fontaine*), Laroŝfuko (*La Rochefoucauld*).

4. Malforta ligiĝo de la difina artikolo

Kiam aliaj etnolingvoj asimilas toponimojn, en kiuj troviĝas difina artikolo, ne estas regulo por ekscii, ĉu oni konservu aŭ eliminu ĝin. Komparu jenajn Anglajn nomformojn sen la difina artikolo – *Havana, Porto, Valleta/Valetto* – kun tiuj ĉi havantaj la artikolon – *The Hague, La Rochelle, El Salvador*.

En La Chaux-de-Fonds la loĝanto nomiĝas *Chaux-de-Fonnier*, kaj la du adjektivoj derivitaj de la urbonomo estas *chaux-de-fonnier* kaj *chauxois*. Plie, korespondanto informis min, ke oni diras *je vais à Chaux-de-Fonds* (mi iras al C.d.F) anstataŭ *je vais à La Chaux-de-Fonds* (3). Jen atestoj, ke la difina artikolo *la* ne forte ligiĝas al la resto de la nomo. Ĉu, do, ĝi havu lokon en la esperantigita formo de la nomo?

Unu el la argumentoj por konservi la difinan artikolon estas por faciligi serĉadon de la nomo en ne-Esperantaj konsult-libroj kiel atlasoj, mapoj, transportil-horaroj ks. Tamen, sukceso ne estas tutcerta. Legante *Laŝodfono* aŭ *Laŝodefono*, oni povas diveni la unuan silabon de la Franca nomo, sed sen antaŭa scio pri la principoj de asimilado de Francaj nomoj kaj vortoj, oni ne scias, kiel skribi *ŝod* kaj *fon* etnolingve. Tio apogas la kontraŭan vidpunkton, ke *la* estas nebezona superflua silabo.

5. Nekonsekvencia asimilado de loknomoj fare de Svisoj

Pluraj ekzemploj troviĝas en SER. Ekzemple, la redakcio esperantigas *Le Locle* per la formo

Leloklo. Ĉu tio estas precedento por ŝanĝi la ĝis nun uzatan Ĉodefono al Laĉodefono? Aŭ ĉu *Le Locle* fariĝu *Loklo* en Esperanto? En parto de artikolo subtitolita "Kiu bezonas solvon?" (4), la redaktoro de SER konkludas jene :

"Ĉiuokaze, unu afero estas certa : dum cerbumas kaj interdiskutas fakuloj kaj proponemuloj, la bunta amaso de la Esperantistaro serene ignoras la problemon kaj kontente elturniĝas sen ĝenerala solvo. Nenio urĝas, do!" (p. 21).

Tio ŝajnas konsilo de malespero. Similan sintenon dividas tri aliaj Svisoj, Tazio Carlevaro, Andy Künzli kaj Claude Gacond, en kies artikoloj iuj Svislandaj toponimoj arbitre aperas jen asimilitaj, jen en la originala etnolingva formo.

Asimilitaj formoj : *Argovio, Ĝenevo, Lucerno, San-Bernardo, San-Gotardo, Savojo, Ŝvico, Tiĉino, Turgovio, Uri, Untervaldo, Valezo, Vaŭdo, Zuriko*.

Neasimilitaj formoj : *Aix-les-Bains, Appenzell, Chamonix, Interlaken, Sankt-Gallen, Schwitz, Stans, Unterwalden, Uri, Zug*.

En artikolo pri tradukado de urbonomoj (5), Giorgio Silfer donas diversajn konsilojn. En la kazo de *La Chaux-de-Fonds*, li asimilas la nomon sen difina artikolo, transskribante *Ch* per *Ĉ* kaj eliminante la pluralon ĉe *-fonds*. Tamen, li hezitas inter *-fondo* kaj *-fono* ĉe la fino de la esperantigita formo.

Mi daŭrigis mian esploron, serĉante aliajn vojojn kondukantajn for de la kaoso.

6. Esperantigo de Latina nomo

Kekfoje, se ne ekzistas sufiĉe internacia formo de etnolingva nomo, estas eble uzi la Latinan etimon por krei la Esperantan nomon.

Ekzemple, la landnomo *Hispanio* baziĝas sur L. Hispania, ĉar la nomoj en aliaj etnolingvoj estas malsamaj : H. *España*, F. *Espagne*, A. *Spain*, G. *Spanien*. Bedaŭrinde, *La Chaux-de-Fonds* ne havis Latinan nomon, ĉar la Romanoj neniam vizitis tiun regionon. Sekve, tiu vojo al solvo estas sakostrato.

7. Traduko de etnolingva nomo

La nomo *Fajrolando* estas traduko de H. *Tierra del Fuego*; en tiu ĉi ekzemplo Esperanto sekvas la kutimon de aliaj etnolingvoj : F. *Terre de Feu*, I. *Terra del Fuoco*, G. *Feuerland*. En la kazo de *La Chaux-de-Fonds*, estas tubero en la afero, ĉar ne estas akordo pri la signifo de la morfemoj *chaux* kaj *fonds*. Jen la du hipotezoj :

1. *chaux* (bas-Latina *chalmis/calmis*) – kalvejo, senarbara loko, herbejo, paŝtejo.

fond - fundo.

Sekve, *La Chaux-de-Fonds* signifas "la herbejo de la fundo" (6a, 6b); t.e. la herbejo, kiu kuŝas funde de valo.

2. *fonds* – Ĝi ne signifas "fundo" sed "fonto"; alimaniere, oni devus diri *La Chaux-de-la-Fonds*.

chaux - Se *fond* signifas *fonto*, tiam *chaux* estas variaĵo de la adjektivo *chaud(e)*, varma.

Sekve, *la Chaux-de-Fonds* signifas "la varma fonto" (7).

En la regiono estas du fontoj, unu malvarma, la alia varma; tiu ĉi troviĝas ĝuste tie, kie kreskis la urbo.

Pro tiu etimologia malakordo, ankaŭ la traduk-vojo estas barita.

8. Esperantigo de dialekta nomo

En la loka dialekto de la Franca lingvo, la urbonomo estas *La Tchaux* (elp. *laĉo*), sed estas apenaŭ utile asimili tiun nomon kiel *Laĉo* aŭ simple *Ĉo*. Pluformado ne donas kontentigajn

rezultojn; ĉu la loĝantoj estu *Laĉ(o)anoj* aŭ *Ĉ(o)anoj*?!

9. Mallongigo aŭ akronimo de la loknomo

Tiu ĉi propono sekvas tute alian vojon, kaj eble ĝi montriĝos akceptebla en la estonteco. Tre frue enkondukita landnoma akronimo en Esperanto estas *Usono*, formita surbaze de la Anglalingva nomo de la lando *United States of North America*. Alia konata kaj vaste uzata akronimo estas *Benelukso*, kunmetita el la unuaj silaboj de Belgio, Nederlando kaj Luksemburgo. Ankoraŭ ne registrita en vortaroj, sed aŭdata en la parola lingvo, estas *Godoro*, la prononco de la literoj de la eksa *GDR*. La loĝantoj estis *Godoranoj*. Ni provu apliki tiun solvon al *La Chaux-de-Fonds*. Ĝia oficiala mallongigo estas *La Chx-de-Fds*, sed estas malfacile transformi tiujn liter-grupojn en facile prononceblan akronimon, kiu ne estos same longa kiel la originala urbonomo.

Mi rimarkis en leteroj ricevitaĵoj en 1978 kaj 1979 elde Giorgio Silfer, ke li tiutempe uzis la mallongigon *LCdF*. Ĝi ja donas eblon krei akronimon analogan al *GDR/Godoro*. Oni povas elekti aŭ *Loĉodofa* aŭ *Ĉodofa*, sen la *l* de la artikolo. La adjektivoj estas *Loĉodofa* aŭ *Ĉodofa* kaj la loĝantoj nomiĝas *Loĉodofanoj* aŭ *Ĉodofanoj*. Ĉu povas esti, ke la plej simpla propono estas ankaŭ la plej bona solvo?

10. Konkludoj

Surbaze de la ĉi-supre prezentitaj donitaĵoj, la sekvaj procedoj ekzistas por solvi la problemon de la esperantigo de *La Chaux-de-Fonds* :

a. **Formeto de la demando.** Oni kvalifikas ĝin ne-grava aŭ ne-solvebla. Tio evidente ne estas solvo sed lingva strutpolitiko, ĉar estontece la demando denove prezentiĝos, kaj oni postulos solvon.

b. **Atendo, ĝis la uzado decidis.** Oni esperas, ke inter la pluraj konkurantaj formoj, okazos, ke ĉiuj – krom unu – estos rifuzitaj. Tiu formo, kiu supervivos, estante la plej rezista, devos esti akceptita. Bedaŭrinde, tiu procedo povas daŭri jarojn, eĉ jardekojn, kaj ne estas certe, ke unu formo kapablas forpuŝi la rivalojn. Estas sciante, ke decidoj pri lingvaj demandoj ofte dependas de posedo de la plej laŭta voĉo. Pro tio, redaktoroj de periodaĵoj havas potencon rimedon por altrudi siajn preferojn. Kiel ni vidis ĉi-supre, ne estas akordo inter ili pri asimilado de la urbonomo *La Chaux-de-Fonds*.

c. **Voĉdonado.** Por rapidigi decidojn pri lingvaj demandoj, oni kelkfoje aranĝas voĉdonadon. Laŭ mia scio, tiu solvo ankoraŭ ne estis proponita en rilato al *La Chaux-de-Fonds*. Ĉiam estas risko, ke lingve nekompetentaj homoj partoprenos en la voĉdonado kaj elektos nekonservan nomformon. Pro tio, estas necesa limigo de la voĉdonantoj al specialaj grupoj; ĉu inter ili estu esperantologoj, Franclingvaj lingvistoj, fakuloj pri geografio aŭ nur Esperantistoj el Svislando, precipe loĝantoj de la Romanda Svislando kaj urbanoj de *La Chaux-de-Fonds*?

ĉ. **Racia solvo surbaze de principoj de asimilado.** Mi pledas por la starigo de gvidlinioj por asimilado de etnolingvaj vortoj kaj propraj nomoj. Mi opinias, ke per apliko de raciaj principoj, estos eble atingi kontentigan esperantigon ne nur de Svislandaj toponimoj sed ankaŭ de ĉiuj loknomoj sur la vasta teritorio de Franclingvio. Ankaŭ grava estas analogio kun similaj Franclingvaj nomoj jam asimilitaj en Esperanto. Ĉi-specaj detale ellaboritaj reguloj jam estis formulitaj por la Nederlanda kaj la Hispana lingvoj (8a, 8b). Urĝe bezonata estas simila studo por la Franca.

11. Notoj

1a. Bernard GOLDEN. Ĉodofono, Ŝodofono aŭ Ĉaŭdefondo? *Svisa Esperanto-Revo*. 1989: 3, Aprilo, p. 13-15.

1b. ----- Ĉu uzo de la urbonomo *Ŝodofono* estas pravigebla? *Aperonta*.

2. André ALBAULT. Onomastiko kaj la Akademio. *Literatura Foiro*. 1991 : 131, Junio, p. 50-54. Vd. p. 52.

3. Letero de s-ino Mireille GROSJEAN al la aŭtoro, 1989.05.08.

4. Andres BICKEL. Esperantigo de propraj nomoj : harmoniigi skribon kaj prononcon. *Svisa Esperanto-Revo*. 1990 : Aprilo, 2-3, p. 19-21.

5. Giorgio SILFER. Kiel traduki urbonomojn. *Literatura Foiro*. 1990 : 126, Aŭgusto, p. 38-41. Vd. p. 41.

6a. Letero de s-ino Mireille GROSJEAN al la aŭtoro, 1989.05.28.

6b. *Dictionnaire du Parler Neuchâtelois et Suisse Romand*. 1926.

7. Letero de Claude GACOND al s-ino Mireille GROSJEAN, 1989.06.04.

8a. Wouter F PILGER. Problemoj de esperantigo de nederland(lingv)aj loknomoj. P. 557-570 en : *Serta Gratvatoria in honorem Juan Régulo*. II Esperantismo. La Laguna : Universidad de La Laguna, 1987. 790 p.

8b. Bernard GOLDEN. Principoj por la esperantigo de hispanlingvaj vortoj kaj propraj nomoj. P. 235-257 en : *Serta Gratvatoria in honorem Juan Régulo*. II Esperantismo. La Laguna : Universidad de La Laguna, 1987. 790 p.

N. d. I. R. : Ĉu ne ekzistas kazoj, kie asimilado de urbonomoj jam en Latina alfabeto estas almenaŭ nun ankoraŭ nedezirinda? Ekzemple pri la nomoj, kiuj komenciĝas per Saint-, San-, São . . . , konservo de la originala ortografio (eventuale kun interkrampa fonetika transliterigo ĉe la unua apero) ebligas distingi inter similaj nomoj de diversaj landoj. Same pri vortoj, kies etimologio restas duba, almenaŭ ĝis estonta klarigo.—

(J.T.)

Rimarko : Sendepende de la opinio pri bezonateco aŭ pri senutileco de tiu asimilado por urbeto ne konata ekster la movado, oni devas agnoski, ke la aŭtoro elektis tre taŭgan ekzemplon por ilustrati la plej multajn problemojn, kiuj estas troveblaj en tiu klopodo pri asimilado de toponimoj kaj propraj nomoj.

Aliparte la aŭtoro, laŭdirinde, provis trovi aliajn vojojn kaj eĉ "metis sian fingron" sur vojon tute ne esploritan (fino de lia 4-a punkto)! Tiu vojo konsistus el la starigo de rimedoj por "faciligi serĉadon de la nomo en ne-Esperantaj konsultlibroj kiel atlasoj, mapoj, transportilhoraroj ks." Ni alproksimigu tiun novan ideon al la "akomodaj rimedoj", kiujn Waringhien aludas en la eseero : "1887 kaj la sekvo . . ." (p. 96).— Jen klarigo per ekzemplo! "Pli facile serĉebla" estus (La-)Ĉaŭ-de-Fondo, aŭ eĉ (kun Waringhien) : (La-)Ĉaŭ-de-fondo! Kaj ĉar praktike ĉiuj au de Eŭropo kaj de aliloke prononciĝas aŭ, aŭ asimiliĝas al aŭ, oni eĉ povus formeti la supersignon. Tiam oni rimarkas, ke el la originala nomo oni formetis nur la iam aldonitan "kakografion" x; pri *fonds* oni konstata, ke ĝi en vortaroj pri familinomoj estas agnoskita, kiel devenanta de L. *fundus* kaj signifanta *ne prikonstruita bieno* : do tie ne estus singarde paroli pri kakografio (?).— Ĉu tiu vojo ne estus esplorinda, "eĉ se, en iaj okazoj, tio iom misformus la nacian prononcon" (Waringhien)! Ĉar finfine gravas nur, ke la Esperantistoj interkonsentu sur tre pragmatika bazo pri skribo kaj prononco : pri la nacia prononco ili devas ĉiuokaze rezigni!

(A. A.)

Demandoj kaj Respondoj

(fino de la paĝo 8)

bibliografio, kiu kovras la periodon de 1905 ĝis niaj tagoj. Aliparte ekzistas en preparo dua eldono de la Baza Radikaro Oficiala, korektita kaj suplementita de alfabeto listo. Sed ni hezitas ĝin eldoni kaj ni faros tion, nur se ni ricevas pozitivajn reagojn. —

(A. A.)

Demandoj kaj Respondoj

Ne gravas, se iafoje vi ne konsentas . . .

La vivo estas tia, ke ĉio progresas nur el kontraŭstarigo de ideoj! La sola problemo estas konscii tian neceson! Kaj ne transformi kontraŭstaron de ideoj en kontraŭstaron de homoj!

*

D. En rilato al. – Mi ĵus devis skribi leteron, en kiu mi devis uzi la esprimon *rilate*. Mi hezitis, ĉu mi devas uzi la akuzativon post ĝi. Mi trovis en PIV kvar ekzemplojn Zamenhofajn kun la akuzativo. En PAG nenion klarigan . . . Tamen mi ŝatus scii la kialon. En la Zamenhofaj ekzemploj *rilate* estas uzata por *pri*, aŭ *pro* . . . do kiel prepozicio. Do kial skribi aŭ diri : *rilate libron*, anstataŭ *rilate libro*, same kiel *pri libro*, *pro malsano*, ktp? Ĉu tie la akuzativo ne estas iom superflua, redunda, kiel oni diras nun por ŝajni klera? –

(D-ro J. Tortel)

R. – *Post rilate (adverbo) la akuzativo ne estas superflua, ĉar ĝi anstataŭas la prepozicion al laŭ la 14-a Fundamenta Regulo; efektive la plena formo de la prepoziciaĵo estas : en rilato al kaj la formeto de al post la adverbo rilate eblas nur per la uzo de -n.* –

(J.T.)

D. – S-ro C.J. Günkel deziras esti informita pri la Akademias eldonaĵoj.

R. – *Parta respondo troveblas en La Letero n-ro 12, p. 4 : Referencoj de Akademias decidoj. Tie vi legos detalojn pri la 8 Oficialaj Aldonoj al la Univerŝala Vortaro. Aliparte baldaŭ aperos la AKTOJ, III (1975-1991) de la Akademio; sur la paĝo 9 estos trovebla sub la titolo Akademias periodaĵoj kaj publikaĵoj*

(fino sur paĝo 7)

"LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO". trimestra informala letero eldonita de "La Amikoj de l' Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS, Francio. – *Redaktoro* : Jean THIERRY. – *Direktoro de la publikaĵo* : André BOURDEAUX. – *Presejo* : COCONNIER, 72300 SABLÉ. C. P. P. n-ro 6971. – *Prezo* : 1 n-ro : 40 FRF. – Jara abono : 120 FRF Pagebla ĉe kontoj :

Banka : Crédit Lyonnais n-ro 7090 F – Poŝtĉekonta : 735 27 B Paris. – UEA : Poŝta banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag) : precizigi "por la Amikoj de l' Akademio de Esperanto".

Perantoj por diversaj landoj :

Aŭstralio : Libroŝerbo de A. E. A., Post Office Box 230, MATRAVILLE, N.S.W., 2036 Aŭstralio.

Azio (tuta) : S-ro UMEDA Yosimi, I. P. O. B. 5458, TOKYO 100-31, Japanio.

Brazilo : Brazila Esperanto-Ligo : SeS Ed Jockey Club-Sala 103. BR 70300 BRASILIA DF (caixa postal 11 11 05), Brazilo.

Germanio : S-ro Claus J. GÜNKEL, Im Lichtenfelde 70, D W 4790 PADERBORN, Germanio

Kubo : S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (Eo-redakcio de Radio Havano), Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA, Kubo.

Meksiko : S-ro Enrique LEMUS RODRIGUEZ, Insurgentes Sur, 3493 villa Ilimpica edif. 27-001, 14020 TLALPAN MÉXICO DF Meksiko.

Svedio : Sveda Esperanta Federacio : c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S 242 94 HORBY, Svedio.

Usono : Eldonejo Bero : P. O. Box 13492, BERKELEY CA 94701, Usono.

Imp. COCONNIER - 72300 SABLÉ